La Mortodanco

By Algernon Blackwood.

LA MORTODANCO

from "The Dance of Death" by

ALGERNON BLACKWOOD

Premsigno

La Mortodanco

Braŭno iris al la balo sentante sin vere deprimita, ĉar la kuracisto ĵus avertis lin, ke lia koro estas malforta kaj ke li devas treege singardi pri la afero de strecĉo.

"Dancado?" li demandis, kun tiu ŝajniga leĝereco kiun kelkaj naturoj afektas alfronte severan ŝokon—la kuraĝa instinkto kaŝi doloron.

"Nu—modere, eble," zumis la kuracisto. "Ne *sovaĝe*!" li aldonis, kun rideto ke perfidis io pli ol nura profesia simpatio.

En ajna alia tempo Braŭno verŝajne ridus, sed la serioza maniero de la kuracisto metis tuŝon da glacio sur la fontojn de rideco. En la aĝo de dudek ses jaroj oni apenaŭ konscias morton; la vivo estas ankoraŭ senfina; kaj estas nur maljunuloj kiuj havas "korojn" kaj tiajn afliktojn. Tiel ĝi estis ke la profesia verdikto venis kiel vera ŝoko; kaj kun ĝi ankaŭ, kiel subita revelacio, venis tiu eta pliiĝo de simpatio por aliaj, kiu estas parto de ĉiu profunda sperto dum la jaroj alvenas kaj preterpasas.

Komence li pensis sendi ekskuzon. Li ĉirkaŭe iris singarde, postulante ke la 'busoj haltu kiel mortinte antaŭ ol li elirus, kaj suprenirante ĉiujn ŝtupojn tre malrapide. Tiam, grade li pli alkutimiĝis al la ŝarĝo pro sia terura sekreto: la ordinaraj eventoj de la tago; la malamitan tedan laboradon de la oficejo, kie li estis subpaga komizo; la interago kun aliaj viroj, kiuj portis similajn afliktojn kun supozita indiferenteco; la troa kritikado de la administranto, timigante lin pri sia posteno—ĉio ĉi helpis malpliigi la senton de komenca alarmo, kaj, anstataŭ sendi senkulpigon, li iris al la balo, kiel ni vidis, sentante sin profunde deprimita kaj moviĝanta ĉiam kvazaŭ li portis en la flanko rompiĝan vitran globon, kiu eĉ de la plej malgranda frapiĝo eble rompiĝus en mil pecojn.

La spontanea gajeco, kiu estas natura al balo por gejunuloj servis, tamen por emfazi vive la kontraston de sia propra humoro, kaj tre

konsciigis lin denove pri lia malgranda kaŝita fonto de doloro. Sed, kvankam li volonte utiligus simpatian orelon inter la multaj tie, kiujn li intime konis, li tamen ekzercis sin al sindeteno kiu estas natura en sia karaktero, kaj evitis ajnan aludon pri la afero, kiu faris sin tiel ampleksa en lia konscio. Unu-dufoje li estis tentata, sed antaŭvido de la verŝajna konversacio, kiu sekvus, haltigis lin ĉiam ĝustatempe: “Ho, mi *tre bedaŭras*, Sinjoro Braŭno, kaj vi devas ne danci tro vigle, kiel vi scias,” kaj tiam lia senzorga rido dum li rimarkis, ke tio ne iomete gravas, kaj lia malgranda ŝerco dum li girigis sian kun’danc’ant’inon por denove turni sin.

Li sciis, kompreneble, ke nenio estas tre sensacia pri oni esti dirata, ke onies koro malfortas.

Eĉ la kuracisto ridetis iomete; kaj li nun rememoris pli ol unu konaton, kiuj havis la saman problemon kaj traktis ĝin malserioze. Tamen ĝi sonis en la vivo de Braŭno kiel noto de profunda kaj minaca malgajo. Ĝi forkaptis ekster lia atingo per unuopa svingo ĉion, kion li plej amis kaj ĝuis, detruante mil revojn, kaj pentrante la estontecon per malbrila koloro senespera. Li estis idealisto je koro, malamante la sordidan rutinon de la vivo kiun li vivis kiel komerca subulo. Liaj revoj estis pri la malferma aero, pri montoj, arbaroj kaj grandaj ebenaĵoj, pri la maro kaj pri la solecaj lokoj de la mondo. Vento kaj pluvo parolis intime al lia animo, kaj la ŝtormoj de la ĉielo, kiam li aŭdis ilin furiozi nokte ĉirkaŭ lia alta ĉambro en Blumsberio, ekscitis sovaĝajn sopirojn, kiuj hantis lin dum tagojn poste per la voĉoj de la dezerto. Kelkfoje dum la tagmanĝa horo, kiam li provizore eskapis el la artefarita lumo kaj la malvasta aero de sia alta oficeja tabureto, por vidi la blankajn nubojn velantajn supre, kaj aŭdi la venton kantanta en la dratoj, ĝi metis tian febron en lian sangon, ke dum la cetero de la posttagmezo li trovis neeble koncentriĝi pri sia laboro, kaj tiel ĉagrenis la laŭtan voĉan administranton preskaŭ ĝis frenezo.

Havante neniujn anticipojn, kaj tute neniun praktikan komercan kapablon, li estis fortuna, tamen, ĉar li havis “lokon” eĉ ĉi tiun, kaj la malmola fakto, ke promocio estis neverŝajna farigis lin des pli singarda por teni siajn revojn en ilia loko, fari sian laboron kiel eble plej bone, kaj por ŝpari la malmulton, kiom li povis.

Liaj ferioj estis la nuraj punktoj el lumo en alie malgaja ekzisto. Kaj iun tagon, kiam li devus esti sufiĉe ŝparinta, li malklare antaŭĝojis pri vivo proksima al la Naturo, eble kiel paŝtisto sur cent montetoj, loĝanto en la arbaro, proksime al la sono de siaj amataj

arboj kaj akvoj, kie la odoro de la tero kaj tendara fajro estus ĉiam en liaj naztruoj, kaj la fluanta rivereto ĉiam preta por rapide forporti lian boaton en feliĉon.

Kaj nun la sciaĵo, ke li havas malfortan koron, venis por difekti ĉion. Ĝi skuis lian revon tute ĝis la fundamentoj. Ĝi tute deprimis lin. En iu ajn momento la bato eble falus. Ĝi eble kaptus lin en la akvo, naĝante, aŭ duonvoje supren sur la monto, aŭ meze de unu el liaj solecaj vagadoj, ĝuste kiam lia ĝuo plej dependis de lia malzorgemo kaj forgesemo pri korpaj limoj—tiu libereco de la spirito en la sovaĝejo, kiun li tiom amis. Li eĉ povus esti devigita pasigi sian ferion, sen paroli pri la revo de la malproksima estonteco, en iu kampara domo *“kviete,”* anstataŭ ol glore en la ne’sur’tret’itaj sovaĝejoj. La penso kolerigis lin pro doloro. La tutan tagon li estis hantita kaj konsternita, kaj la tutan tagon li aŭdis la venton flustranta inter branĉoj kaj la akvon plaŭdanta ie kontraŭ sablaj bordoj en la suno.

La balo estis malgranda abona okazaĵo, haste aranĝita kaj ĝoje neformala. Ĝi okazis en granda halo, kiu estis uzata tage kiel gimnastikejo, sed la planko estis bona kaj la muziko ege bona. Skermaj glavoj kaj skermaj kaskoj pendis ĉirkaŭe la muroj, kaj alte sub la brunaj tegmenta trabaro troviĝis ŝnuroj, ringoj kaj trapezoj volvitaj for ekster atingo, ilia malbeleco plu kaŝita de aro da hele koloraj flagoj. Nur la lumo ne estis la plej bona, ĉar la halo estis tre longa, kaj la galerio ĉe la malproksima fino ŝvebis en speco de krepusko, kiun plu profundigis la ombroj de la flagoj supre. Sed ĝiaj benkoj disponigis bonegajn lokojn por sidi rande, kie forta lumo ne ĉiam estis esenco por feliĉo, kaj neniu konsideris kritiki.

Komence li dancis singarde, sed grade la spirito de la tempo kaj de la loko mildigis lian deprimon kaj helpis lin forgesi. Li verŝajne troigis la gravecon de sia malsano. Multaj aliaj uloj, eĉ tiel junaj kiel li estis, havis malfortajn korojn kaj pensis nenion pri tio. La tutan tempon, tamen, estis subfluo de malĝojo kaj seniluziiĝo, kiu ne povis esti neita. Io estis foririnta el la vivo. Noto de mallumo estis enŝteliĝinta. Li trovis siajn kun’danc’ant’inojn enuigaj, kaj ili sendube trovis lin eĉ pli enuiga.

Tamen ĉi tiu balo, sen io ajn ŝajne por distingi ĝin de cent aliaj, elstaris en lia tuta sperto kun neforigebla ruĝa marko kontraŭ ĝi. Estas ofta ruzo de la Naturo—kaj profunde signifa—ke, ĝuste kiam malespero estas plej profunda, ŝi svingas magian bastoneton antaŭ la lacaj okuloj kaj faras laŭeble por veki neeblan esperon. Ŝia ideo,

supozeble, estas konservi sian viktimon aktive iranta ĝis la fina fino de la ĉapitro, por ke li ne perdus ion el la leciono, kiun ŝi deziras instrui, pro indiferenteco.

Tiel estis, ke meze de la balo, la senenergia ĵeta rigardo de Braŭno falis sur certan fraŭlinon, kies aspekto tuj galvanizis lin en staton de plej akra ebla deziro. Ekbrilo de blanka lumo eniris lian koron kaj tute flamigis lin por koni ŝin. Ŝi altiris lin ege. Ŝi estis vestita en pala verdo, kaj ĉiam dancis kun la sama viro—viro ĉirkaŭ lia propra alteco kaj kolorigo, kies vizaĝon, tamen, li neniam povis ĝuste vidi. Ili sidis rande kune dum grandan parton de la tempo—ĉiam en la galerio kie la ombroj estis plej profundaj. La vizaĝon de la fraŭlino li vidis klare, kaj estis io pri ŝi, kiu simple levis lin korpe eksteren el si mem kaj sendis strangajn ekscitojn de ĝojo trakurantajn tra li kiel elektraj ŝokoj. Plurfoje iliaj okuloj renkontiĝis, kaj kiam tio okazis, li ne povis forŝiri sian rigardon de ŝi. Ŝi fascinis lin, kaj ĉiuj fortoj en lia esteco kunfandiĝis en unuopa deziro esti kun ŝi, danci kun ŝi, paroli kun ŝi, kaj scii ŝian nomon. Precipe li scivolis, kiu estis la viro, kiun ŝi tiel favoris; li tiel strange rememorigis pri al si mem. Neniu scias precize kiel li mem aspektas, sed ĉi tiu alta malhela figuro, kies vizaĝon li neniam povis aranĝi por vidi, ekigis en li la strangan penson, ke ĝi estas lia propra *sozio*.

Vane li provis plani enkondukon al ĉi tiu fraŭlino. Neniu ŝajnis koni ŝin. Ŝia robo, ŝia hararo, kaj certa mirinda svelta gracio pensigis lin pri juna arbo, svinganta en la vento; pri hederaj folioj; pri io, kio apartenis al la vivo de la arbaro anstataŭ ol al ordinara homaro. Ŝi posedis lin, plenigante liajn pensojn per sovaĝaj arbaraj sonĝoj. Unufoje, ankaŭ, li estis certa, kiam iliaj okuloj renkontiĝis, ke ŝi ridetis al li, kaj la alvoko estis preskaŭ nerezistebla, ke li preskaŭ faligis la brakon de sia kun'danc'ant'ino por postkuri ŝin.

Sed ŝajnis neeble ricevi enkondukon de iu ajn.

"Ĉu vi scias, kiu estas tiu fraŭlino tie?" li demandis unu el siaj kun'danc'ant'inoj, dum li sidis rande de kvadrila danco, duone lacega pro siaj streĉoj; "tiu supre en la galerio?" "Rozkolore?"

"Ne, tiu verde, mi celas."

"Ho, apud la mura floro, la sinjorino en ruĝo!"

"*En* la galerio, ne *sub* ĝi," li klarigis senpacience.

"Mi ne povas vidi supren tie. Estas tiel mallume," respondis la fraŭlino post atenta superrigardo per okulvitroj. "Mi ne pensas, ke mi vidas iun ajn."

"Estas sufiĉe mallume," li rimarkis.

“Kial? Ĉu vi scias, kiu ŝi estas!” ŝi demandis malsaĝe.

Li ne ŝatis insisti. Ĝi ŝajnis tiel malĝentila al lia kun’danc’ant’ino. Sed tia afero okazis unu-dufoje. Evidente neniu konis ĉi tiun fraŭlinon en verdo, aŭ alie li priskribis ŝin tiel malprecize, ke la homoj, kiujn li demandis, rigardis iun alian anstataŭe.

“En tiu verda iome hedere aspekta robo,” li provis alian.

“Kun la rozo en ŝia hararo kaj la ruĝa nazo? Aŭ tiu, kiu sidas rande?”

Post tio li rezignis ĝin finfine. Liaj kun’danc’ant’inoj ŝajnis ekmovi la nazon iomete kiam li demandis. Evidente *la dezirata* ne estis populara fraŭlino. Baldaŭ poste, ankaŭ, ŝi malaperis, kaj li perdis ŝin el la vido. Tamen la penso, ke ŝi eble iris hejmen, igis lian koron sinki en ia terura nigreco.

Li lantis multe pli malfrue ol li intencis esperante ricevi enkondukon, sed finfine, kiam li plenigis ĉiujn siajn rendevuojn, aŭ preskaŭ ĉiujn, li decidis elgliti kaj iri hejmen. Jam estis malfrue, kaj li devis esti en la oficejo—tiu malaminda oficejo—akurate je la naŭa. Li sentis sin laca, terure laca, pli ol iam antaŭe ĉe balo. Ĝi estis, kompreneble, lia malforta koro. Li ankoraŭ lantis dum iom da tempo, tamen, esperante pri alia ekvido de la silfino en verda, malsatante je lasta rigardo, kiun li povus kunporti hejmen kaj eble intermiksigi kun siaj revoj. La nura penso pri ŝi plenigis lin per doloro kaj ĝojo, kaj ia rara delico, kiun li neniam antaŭe konis. Sed li ne povis atendi eterne, kaj jam estis preskaŭ la dua matene. Liaj ĉambroj estis nur mallongan distancon laŭ la strato; li ekbruligus cigaredon kaj promenus hejmen. Ne; li estis forgesinta por momento; sen cigaredo: la kuracisto estis tre severa pri tiu punkto.

Li estis en la ago de turni sian dorson al la girado de dancantaj figuroj, kiam la flagoj ĉe la malproksima fino de la ĉambro disiĝis dum momento en la moviĝanta aero, kaj lia rigardo ripozis sur la galerio apenaŭ videbla inter la ombroj.

Granda doloro rapide trakuris lian koron dum li rigardis.

Tie sidis nur du figuroj: la alta malhela viro, kiu estis lia sozio, kaj la hedera fraŭlino en verda. Ŝi rigardis rekte lin laŭ la longo de la ĉambro, kaj eĉ je tiu distanco li povis vidi, ke ŝi ridetas.

Li haltis subite. La flagoj svingiĝis returne kaj kaŝis la bildon, sed tuje li decidis agi. Tie, inter ĉi tiu malgaja amaso da dancantaj pupoj, estis iu, kiun li vere volis koni, kunparoli, tuŝi—iu, kiu altiris lin pli ol ĉio, kion li iam ajn konis, kaj igis lian animon krii laŭte. La ĉambro estis plena per aŭtomataj manekenoj, sed jen iu *viva*. Li

devas koni ŝin. Estis neeble iri hejmen sen parolo, tute neeble.

Freŝa piko de doloro, pli malbona ol la unua, donis al li momentan paŭzon. Li apogis sin al la muro por momento tuj sub la horloĝo, kie la montriloj montris al du, atendante ĝis la svenigema nigreco forirus. Tiam li pasis plu, ignorante ĝin tute. Ĝi liveris al li, vere, la malgrandan kroman impeton, kiun li bezonis por meti la volon en viglan agon, ĉar ĝi devigante rememorigis lin pri tio, kio *povus* okazi. Lia tempo povus esti mallonga; li konis sufiĉe malmultajn el la bonaj aferoj de la vivo; li kaptus tion, kion li povus. Li havis neniun enkondukon, sed—al la diablo kun la konvencioj. La risko estis nenio. Renkonti ŝiajn okulojn de proksime, aŭdi ŝian voĉon, scii ion pri la parfumo de tiu hararo kaj robo—kio estis la risko de malakcepto kompare kun tio?

Li glitis laŭ la flanko de la longa ĉambro, evitante la dancantojn kiel plej bone li povis. La alta viro, li perceptis, foriris de la galerio, sed la fraŭlino sidadis sola. Li iris supren rapide laŭ la lignaj ŝtupoj, malpeze kiel aero, tremante per anticipo. Lia koro batis kiel rapida kusenetita martelo, kaj la sango ludis tamburinon en liaj oreloj. Estis strange, ke li ne renkontis la altan viron sur la ŝtuparo, sed sendube estis alia elirejo el la galerio, kiun li ne observis. Li atingis la supron de la ŝtuparo kaj turniĝis ĉe la angulo. Per Jovo, ŝi ankoraŭ estis tie, kelkajn futojn antaŭ li, sidanta kun la brakoj sur la balustrado, rigardante malsupren al la dancantoj sube. Liaj okuloj naĝis dum momento, kaj io kaptis la radikojn mem de lia esteco.

Sed li ne hezitis. Li alproksimiĝis tre proksime preter la malplenaj seĝoj, intencante demandi nature kaj simple ĉu li povus petegi la plezuron de danco. Tiam, kiam li estis je kelkaj futoj de ŝia flanko, la fraŭlino subite turniĝis kaj frontis lin, kaj la vortoj formortis sur liaj lipoj. Ili ŝajnis absolute malsaĝaj kaj nesufiĉaj.

“Jes, mi estas preta,” ŝi diris kviete, rigardante rekte en liajn okulojn; “sed vi prenis tiom longe por veni. Ĉu estis tiom granda peno foriri?”

La formo de la demando ŝajnis al li stranga, sed li estis tro feliĉa por paŭzi. Li transfiguriĝis pro ĝojo. La sono de ŝia voĉo tuj superbruis la tutan klakon de la bala salono, kaj ŝajnis al li la sola afero en la tuta mondo. Ĝi ne rompiĝis je la konsonantoj kiel plej multaj homaj paroloj. Ĝi fluis glate; estis la sono de vento inter branĉoj, de akvo fluanta super ŝtonetoj. Ĝi balais en lin kaj forkaptis lin, tiel ke dum momento li vidis siajn amatajn arbarojn kaj montetojn kaj marojn. La steloj estis ie en ĝi ankaŭ, kaj la murmuro

de la ebenaĵoj.

Je la dioj! Jen fraŭlino, kun kiu li povis paroli per la vortoj de silento; ŝi strečis ĉiun ŝnureton en lia animo kaj poste ludis sur ili. Lia spirito pligrandiĝis pro vivo kaj feliĉo. Ŝi volonte aŭskultus ĉion, kio zorgigis lin. Al ŝi li povus paroli malkaŝe pri sia kompatinda rompita koro, ĉar ŝi simpatius. Ja, estis ĉio, kion li povis fari por deteni sin de kurado antaŭen tuj kun la brakoj etenditaj por ĉirkaŭpreni ŝin. Estis parfumo de tero kaj arbaro ĉirkaŭ ŝi.

"Ho, mi estas tiel *terure* ĝoja—" li komencis mallerte, kun la rigardo sur ŝia vizaĝo. Tiam, rememorante ion pri la teraj moroj, li aldonis:

"Mia nomo—e—estas—"

Io nekutima—io nepriskribebla—en ŝia gesto haltigis lin. Ŝi estis moviĝinta por doni al li spacon če sia flanko.

"Via nomo!" ŝi ridis, tirante siajn verdajn jupojn kun milda susuro kiel folioj laŭlonge de la benko por fari spacon; "sed vi bezonas neniun nomon nun, vi scias!"

Ho, la mirindaĵo de ĝi! Ŝi komprenis lin. Li sidiĝis kun la sento, kvazaŭ li estis fluginta en libera vento kaj ripozas inter la suproj de arboj. La ĉambro fadis provizore.

"Sed mia nomo, se vi volas scii, estas Izidio," ŝi diris, ankoraŭ ridetante.

"Fraŭlino Izidio," li balbutis, farante alian provon če la formoj de monda ĝentileco.

"Ne *Fraŭlino* Izidio," ŝi ridis laŭte gaje. Ĝi certe estis la sono de vento en poploj. "Izidio estas mia antaŭnomo; do se vi nomas min io, vi devas nomi min tiel."

La nomo estis pura muziko en liaj oreloj, sed kvankam li fuŝe serĉis en sia memoro por trovi sian propran, ĝi tute malaperis; eĉ por savi sian vivon li ne povis rememori tion, kiel liaj amikoj nomis lin. Li fikse rigardis dum momento, malklare scivolante, preskaŭ ekstaza pro ĝojo. Neniujn aliajn fraŭlinojn, kiujn li konis—ho, la ĉieloj! Ekzistis ne plu aliaj fraŭlinoj! Li neniam konis alian fraŭlinon ol ĉi tiun. Jen lia universo, enkadrigita en verda robo, kun voĉo de maro kaj vento, okuloj kiel la suno, kaj movoj de kliniĝantaj herboj. Ĉio alia estis nura ombro kaj fantazio. Unuafoje en sia ekzistado li estis viva, *kaj sciis, ke li estis viva*.

"Mi estis certa, ke vi venus al mi," ŝi estis diranta. "Vi ne povis sin malhelpi." Ŝia rigardo estis ĉiam sur lia vizaĝo.

"Mi timis komence—"

“Sed viaj pensoj,” ŝi interrompis mallaŭte, “viaj pensoj estis ĉi tie supre kun mi dum la tuta tempo.”

“Vi sciis tion!” li kriis, ĝoje.

“Mi sentis ilin,” ŝi respondis simple. “Ili—vi akompanis min, ĉar mi estadis sola ĉi tie dum la tuta vespero. Mi konas neniun alian ĉi tie—ankoraŭ.”

Ŝiaj vortoj mirigis lin. Li estis tuj demandonta, kiu estis la alta malhela viro, kiam li vidis, ke ŝi estis leviĝanta sur siajn piedojn kaj ke ŝi volis danci.

“Sed mia koro—” li balbutis.

“Ne vundos vian kompatindan koron danci kun mi, vi scias,” ŝi ridis. “Vi rajtas fidi min. Mi scipovos prizorgi ĝin.”

Braŭno sentis sin simple ekstaza; ĝi estis tro mirinda por esti vera; estis neeble—ĉi tiu renkontiĝo en Londono, ĉe ordinara enuiga balo, en la dudeka jarcento. Li vekiĝus baldaŭ el sonĝo pri arĝento kaj oro. Tamen li sentis eĉ tiam, ke ŝi tiras lian brakon ĉirkaŭ sia talio por la danco, kaj per tiu unua magia tuŝo li preskaŭ perdis la konscion kaj pasis kun ŝi en staton de pura spirito.

Konfuzis lin dum momento, kiel ili atingis la plankon tiel rapide kaj trovis sin inter la girantaj paroj. Li havis neniun memoron pri malsupreniro de la ŝtuparo. Sed dume li dancis sur flugiloj, kaj la fraŭlino en verda apud li ŝajnis flugi ankaŭ, kaj dum li premis ŝin al sia koro, li trovis neeble pensi pri io alia en la mondo krom tio—tio kaj lia miriga feliĉo.

Kaj la muziko estis ene de ili, kontraŭe al ekstere; ja ili ŝajnis krei sian propran muzikon el siaj rapidaj girantaj movoj, ĉar ĝi neniam ĉesis kaj li neniam laciĝis. Lia koro estis ĉesinta dolori sin. Aliaj kuriozaj aferoj okazis, ankaŭ, sed li apenaŭ rimarkis ilin; aŭ, pli ĝuste, ili ne plu ŝajnis strangaj. En tiu homamasa bala salono ili neniam eĉ unufoje tuŝis aliajn homojn. Lia kun’danc’ant’ino bezonis neniun gvidon. Ŝi ne faris sonon. Tiam subite li konsciis, ke liaj propraj piedoj ne faris sonon ankaŭ. Ili glitis laŭ la planko per senbruaj piedoj kiel spiritoj dancantaj. Neniu alia ŝajnis eĉ iomete rimarki ilin. La plej multaj el la vizaĝoj ŝajnis, ja, strangaj al li nun, kvazaŭ li ne vidis ilin antaŭe, sed unu-dufoje li estus povinta ĵuri, ke li preterpasas parojn, kiuj dancis preskaŭ same feliĉe kaj malpeze kie ili mem, parojn kiujn li estis koninta en pasintaj jaroj, parojn kiuj estis mortintaj.

Grade la ĉambro malpleniĝis de siaj originaj venintoj, kaj aliaj plenigis iliajn lokojn, silente, per aeraj graciaj movoj kaj feliĉaj

vizaĝoj, ĝis la tuta planko finfine estis kovrita per la sensonaj piedoj kaj girantaj formoj de tiuj, kiuj jam forlasis la mondon. Kaj, dum la artefarita lumo fadis, venis en ĝia loko milda blanka lumo, kiu plenigis la ĉambron per beleco kaj faris ĉiujn vizaĝojn aspekti radiaj. Kaj, unufoje, dum ili glitis laŭ preter spegulo, li vidis, ke la fraŭlino apud li ne estis tie—ke li ŝajnis danci sole, kunpremante neniun; tamen, kiam li ĵete rigardis malsupren, tie estis ŝia magia vizaĝo ĉe lia ŝultro, kaj li sentis ŝian malgrandan formon premadi kontraŭ li.

Tia dancado, ankaŭ, li neniam eĉ sonĝis pri, ĉar ĝi estis kiel balanciĝi kun la arbaj suproj en la ventoj.

Tiam ili dancis pli foren, ĉiam pli rapide kaj pli rapide, preter la ombroj sub la galerio, sub la senmovaj pendantaj flagoj—kaj eksteren en la nokton. La muroj estis malantaŭ ili. Ili estis ne plu sur iliaj piedoj kaj la vento estis en iliaj hararoj. Ili estis leviĝantaj, leviĝantaj, leviĝantaj al la steloj.

Li sentis la malvarmetan aeron de la malferma ĉielo sur siaj vangoj, kaj kiam li rigardis malsupren, dum ili superis la supron de la mallume kuŝantaj montetoj, li vidis, ke Izidio for'fandiĝis inter lin mem kaj ili fariĝis unu estaĵo. Kaj li sciis tiam, ke lia koro neniam plu doloros lin en la mondo, nek timigos lin pro iu ajn el liaj amataj revoj.

Sed la administranto de la "malaminda oficejo" nure sciis du tagojn poste, kial Braŭno ne aperis ĉe sia skribtablo, nek sendis iun vorton por klarigi sian foreston. Li legis ĝin en la gazeto—kiel li falis mortinta ĉe balo, subite trafita de kora malsano. Ĝi okazis ĵus antaŭ la dua horo matene.

"Nu," pensis la administranto, "li estas nenia perdo por ni ĉiaokaze. Li havis neniajn realajn komercajn instinktojn. Smito faros lian laboron tre pli bone—kaj por malpli da mono, ankaŭ."

The Dance of Death

Browne went to the dance feeling genuinely depressed, for the doctor had just warned him that his heart was weak and that he must be exceedingly careful in the matter of exertion.

"Dancing?" he asked, with that assumed lightness some natures affect in the face of a severe shock—the plucky instinct to conceal pain.

"Well—in moderation, perhaps," hummed the doctor. "Not *wildly*!" he added, with a smile that betrayed something more than mere professional sympathy.

At any other time Browne would probably have laughed, but the doctor's serious manner put a touch of ice on the springs of laughter. At the age of twenty-six one hardly realises death; life is still endless; and it is only old people who have "hearts" and suchlike afflictions. So it was that the professional dictum came as a real shock; and with it too, as a sudden revelation, came that little widening of sympathy for others that is part of every deep experience as the years roll up and pass.

At first he thought of sending an excuse. He went about carefully, making the 'buses stop dead before he got out, and going very slowly up steps. Then gradually he grew more accustomed to the burden of his dread secret: the commonplace events of the day; the hated drudgery of the office, where he was an underpaid clerk; the contact with other men who bore similar afflictions with assumed indifference; the faultfinding of the manager, making him fearful of his position—all this helped to reduce the sense of first alarm, and, instead of sending an excuse, he went to the dance, as we have seen, feeling deeply depressed, and moving all the time as if he carried in his side a brittle glass globe that the least jarring might break into a thousand pieces.

The spontaneous jollity natural to a boy and girl dance served, however, to emphasise vividly the contrast of his own mood, and to

make him very conscious again of his little hidden source of pain. But, though he would gladly have availed himself of a sympathetic ear among the many there whom he knew intimately, he nevertheless exercised the restraint natural to his character, and avoided any reference to the matter that bulked so largely in his consciousness. Once or twice he was tempted, but a prevision of the probable conversation that would ensue stopped him always in time: "Oh, I *am* so sorry, Mr. Browne, and you mustn't dance too hard, you know," and then his careless laugh as he remarked that it didn't matter a bit, and his little joke as he whirled his partner off for another spin.

He knew, of course, there was nothing very sensational about being told that one's heart was weak.

Even the doctor had smiled a little; and he now recalled more than one acquaintance who had the same trouble and made light of it. Yet it sounded in Browne's life a note of profound and sinister gloom. It snatched beyond his reach at one fell swoop all that he most loved and enjoyed, destroying a thousand dreams, and painting the future a dull drab colour without hope. He was an idealist at heart, hating the sordid routine of the life he led as a business underling. His dreams were of the open air, of mountains, forests, and great plains, of the sea, and of the lonely places of the world. Wind and rain spoke intimately to his soul, and the storms of heaven, as he heard them raging at night round his high room in Bloomsbury, stirred savage yearnings that haunted him for days afterwards with the voices of the desert. Sometimes during the lunch hour, when he escaped temporarily from the artificial light and close air of his high office stool, to see the white clouds sailing by overhead, and to hear the wind singing in the wires, it set such a fever in his blood that for the remainder of the afternoon he found it impossible to concentrate on his work, and thus exasperated the loud-voiced manager almost to madness.

Having no expectations, and absolutely no practical business ability, he was fortunate, however, in having a "place" at all, and the hard fact that promotion was unlikely made him all the more careful to keep his dreams in their place, to do his work as well as possible, and to save what little he could.

His holidays were the only points of light in an otherwise dreary existence. And one day, when he should have saved enough, he looked forward vaguely to a life close to Nature, perhaps a

shepherd on a hundred hills, a dweller in the woods, within sound of his beloved trees and waters, where the smell of the earth and camp fire would be ever in his nostrils, and the running stream always ready to bear his boat swiftly away into happiness.

And now the knowledge that he had a weak heart came to spoil everything. It shook his dream to the very foundations. It depressed him utterly. Any moment the blow might fall. It might catch him in the water, swimming, or halfway up the mountain, or midway in one of his lonely tramps, just when his enjoyment depended most upon his being reckless and forgetful of bodily limitations—that freedom of the spirit in the wilderness he so loved. He might even be forced to spend his holiday, to say nothing of the dream of the far future, in some farmhouse *"quietly,"* instead of gloriously in the untrodden wilds. The thought made him angry with pain. All day he was haunted and dismayed, and all day he heard the wind whispering among branches and the water lapping somewhere against sandy banks in the sun.

The dance was a small subscription affair, hastily arranged and happily informal. It took place in a large hall that was used in the daytime as a gymnasium, but the floor was good and the music more than good. Foils and helmets hung round the walls, and high up under the brown rafters were ropes, rings, and trapezes coiled away out of reach, their unsightliness further concealed by an array of brightly coloured flags. Only the light was not of the best, for the hall was very long, and the gallery at the far end loomed in a sort of twilight that was further deepened by the shadows of the flags overhead. But its benches afforded excellent sitting-out places, where strong light was not always an essential to happiness, and no one dreamed of finding fault.

At first he danced cautiously, but by degrees the spirit of the time and place relieved his depression and helped him to forget. He had probably exaggerated the importance of his malady. Lots of other fellows, even as young as he was, had weak hearts and thought nothing of it. All the time, however, there was an undercurrent of sadness and disappointment not to be denied. Something had gone out of life. A note of darkness had crept in. He found his partners dull, and they no doubt found him still duller.

Yet this dance, with nothing apparently to distinguish it from a hundred others, stood out in all his experience with an indelible red mark against it. It is a common trick of Nature—and a profoundly

significant one—that, just when despair is deepest, she waves a wand before the weary eyes and does her best to waken an impossible hope. Her idea, presumably, being to keep her victim going actively to the very end of the chapter, lest through indifference he should lose something of the lesson she wishes to teach.

Thus it was that, midway in the dance, Browne's listless glance fell upon a certain girl whose appearance instantly galvanised him into a state of keenest possible desire. A flash of white light entered his heart and set him all on fire to know her. She attracted him tremendously. She was dressed in pale green, and always danced with the same man—a man about his own height and colouring, whose face, however, he never could properly see. They sat out together much of the time—always in the gallery where the shadows were deepest. The girl's face he saw clearly, and there was something about her that simply lifted him bodily out of himself and sent strange thrills of delight coursing over him like shocks of electricity. Several times their eyes met, and when this happened he could not tear his glance away. She fascinated him, and all the forces in his being merged into a single desire to be with her, to dance with her, speak with her, and to know her name. Especially he wondered who the man was she so favoured; he reminded him so oddly of himself. No one knows precisely what he himself looks like, but this tall dark figure, whose face he never could contrive to see, started the strange thought in him that it was his own *double*.

In vain he sought to compass an introduction to this girl. No one seemed to know her. Her dress, her hair, and a certain wondrous slim grace made him think of a young tree waving in the wind; of ivy leaves; of something that belonged to the life of the woods rather than to ordinary humanity. She possessed him, filling his thoughts with wild woodland dreams. Once, too, he was certain when their eyes met that she smiled at him, and the call was so well-nigh irresistible that he almost dropped his partner's arm to run after her.

But it seemed impossible to obtain an introduction from anyone.

"Do you know who that girl is over there?" he asked one of his partners while sitting out a square dance, half exhausted with his exertions; "the one up there in the gallery?" "In pink?"

"No, the one in green, I mean."

"Oh, next the wallflower lady in red!"

"*In* the gallery, not *under* it," he explained impatiently.

"I can't see up there. It's so dark," returned the girl after a careful survey through glasses. "I don't think I see anyone at all."

"It is rather dark," he remarked.

"Why? Do you know who she is!" she asked foolishly.

He did not like to insist. It seemed so rude to his partner. But this sort of thing happened once or twice. Evidently no one knew this girl in green, or else he described her so inaccurately that the people he asked looked at someone else instead.

"In that green sort of ivy-looking dress," he tried another.

"With the rose in her hair and the red nose? Or the one sitting out?"

After that he gave it up finally. His partners seemed to sniff a little when he asked. Evidently *la désirée* was not a popular maiden. Soon after, too, she disappeared and he lost sight of her. Yet the thought that she might have gone home made his heart sink into a sort of horrible blackness.

He lingered on much later than he intended in the hope of getting an introduction, but at last, when he had filled all his engagements, or nearly all, he made up his mind to slip out and go home. It was already late, and he had to be in the office—that hateful office—punctually at nine o'clock. He felt tired, awfully tired, more so than ever before at a dance. It was, of course, his weak heart. He still dawdled a little while, however, hoping for another glimpse of the sylph in green, hungering for a last look that he could carry home with him and perhaps mingle with his dreams. The mere thought of her filled him with pain and joy, and a sort of rarefied delight he had never known before. But he could not wait forever, and it was already close upon two o'clock in the morning. His rooms were only a short distance down the street; he would light a cigarette and stroll home. No; he had forgotten for a moment; without a cigarette: the doctor had been very stern on that point.

He was in the act of turning his back on the whirl of dancing figures, when the flags at the far end of the room parted for an instant in the moving air, and his eye rested upon the gallery just visible among the shadows.

A great pain ran swiftly through his heart as he looked.

There were only two figures seated there: the tall dark man, who was his double, and the ivy girl in green. She was looking straight at him down the length of the room, and even at that distance he

could see that she smiled.

He stopped short. The flags waved back again and hid the picture, but on the instant he made up his mind to act. There, among all this dreary crowd of dancing dolls, was someone he really wanted to know, to speak with, to touch—someone who drew him beyond all he had ever known, and made his soul cry aloud. The room was filled with automatic lay-figures, but here was someone *alive*. He must know her. It was impossible to go home without speech, utterly impossible.

A fresh stab of pain, worse than the first, gave him momentary pause. He leant against the wall for an instant just under the clock, where the hands pointed to two, waiting for the swooning blackness to go. Then he passed on, disregarding it utterly. It supplied him, in truth, with the extra little impetus he needed to set the will into vigorous action, for it reminded him forcibly of what *might* happen. His time might be short; he had known few enough of the good things of life; he would seize what he could. He had no introduction, but—to the devil with the conventions. The risk was nothing. To meet her eyes at close quarters, to hear her voice, to know something of the perfume of that hair and dress—what was the risk of a snub compared to that?

He slid down the side of the long room, dodging the dancers as best he could. The tall man, he noted, had left the gallery, but the girl sat on alone. He made his way quickly up the wooden steps, light as air, trembling with anticipation. His heart beat like a quick padded hammer, and the blood played a tambourine in his ears. It was odd he did not meet the tall man on the stairs, but doubtless there was another exit from the gallery that he had not observed. He topped the stairs and turned the corner. By Jove, she was still there, a few feet in front of him, sitting with her arms upon the railing, peering down upon the dancers below. His eyes swam for a moment, and something clutched at the very roots of his being.

But he did not hesitate. He went up quite close past the empty seats, meaning to ask naturally and simply if he might beg for the pleasure of a dance. Then, when he was within a few feet of her side, the girl suddenly turned and faced him, and the words died away on his lips. They seemed absolutely foolish and inadequate.

“Yes, I am ready,” she said quietly, looking straight into his eyes; “but what a long time you were in coming. Was it such a great effort to leave?”

The form of the question struck him as odd, but he was too happy to pause. He became transfigured with joy. The sound of her voice instantly drowned all the clatter of the ballroom, and seemed to him the only thing in the whole world. It did not break on the consonants like most human speech. It flowed smoothly; it was the sound of wind among branches, of water running over pebbles. It swept into him and caught him away, so that for a moment he saw his beloved woods and hills and seas. The stars were somewhere in it too, and the murmur of the plains.

By the gods! Here was a girl he could speak with in the words of silence; she stretched every string in his soul and then played on them. His spirit expanded with life and happiness. She would listen gladly to all that concerned him. To her he could talk openly about his poor broken heart, for she would sympathise. Indeed, it was all he could do to prevent himself running forward at once with his arms outstretched to take her. There was a perfume of earth and woods about her.

"Oh, I am so *awfully* glad—" he began lamely, his eyes on her face. Then, remembering something of earthly manners, he added:

"My name—er—is—"

Something unusual—something indescribable—in her gesture stopped him. She had moved to give him space at her side.

"Your name!" she laughed, drawing her green skirts with a soft rustle like leaves along the bench to make room; "but you need no name now, you know!"

Oh, the wonder of it! She understood him. He sat down with a feeling that he had been flying in a free wind and was resting among the tops of trees. The room faded out temporarily.

"But my name, if you like to know, is Issidy," she said, still smiling.

"Miss Issidy," he stammered, making another attempt at the forms of worldly politeness.

"Not *Miss* Issidy," she laughed aloud merrily. It surely was the sound of wind in poplars. "Issidy is my first name; so if you call me anything, you must call me that."

The name was pure music in his ears, but though he blundered about in his memory to find his own, it had utterly vanished; for the life of him he could not recollect what his friends called him. He stared a moment, vaguely wondering, almost beside himself with delight. No other girls he had known—ye heavens above! There

were no longer any other girls! He had never known any other girl than this one. Here was his universe, framed in a green dress, with a voice of sea and wind, eyes like the sun, and movements of bending grasses. All else was mere shadow and fantasy. For the first time in his existence he was alive, *and knew that he was alive*.

"I was sure you would come to me," she was saying. "You couldn't help yourself." Her eyes were always on his face.

"I was afraid at first—"

"But your thoughts," she interrupted softly, "your thoughts were up here with me all the time."

"You knew that!" he cried, delighted.

"I felt them," she replied simply. "They—you kept me company, for I have been alone here all the evening. I know no one else here—yet."

Her words amazed him. He was just going to ask who the tall dark man was, when he saw that she was rising to her feet and that she wanted to dance.

"But my heart—" he stammered.

"It won't hurt your poor heart to dance with me, you know," she laughed. "You may trust me. I shall know how to take care of it."

Browne felt simply ecstatic; it was too wonderful to be true; it was impossible—this meeting in London, at an ordinary dull dance, in the twentieth century. He would wake up presently from a dream of silver and gold. Yet he felt even then that she was drawing his arm about her waist for the dance, and with that first magical touch he almost lost consciousness and passed with her into a state of pure spirit.

It puzzled him for a moment how they reached the floor so quickly and found themselves among the whirling couples. He had no recollection of coming down the stairs. But meanwhile he was dancing on wings, and the girl in green beside him seemed to fly too, and as he pressed her to his heart he found it impossible to think of anything else in the world but that—that and his astounding happiness.

And the music was within them, rather than without; indeed they seemed to make their own music out of their swift whirling movements, for it never ceased and he never grew tired. His heart had ceased to pain him. Other curious things happened, too, but he hardly noticed them; or, rather, they no longer seemed strange. In that crowded ballroom they never once touched other people. His

partner required no steering. She made no sound. Then suddenly he realised that his own feet made no sound either. They skimmed the floor with noiseless feet like spirits dancing. No one else appeared to take the least notice of them. Most of the faces seemed, indeed, strange to him now, as though he had not seen them before, but once or twice he could have sworn that he passed couples who were dancing almost as happily and lightly as themselves, couples he had known in past years, couples who were dead.

Gradually the room emptied of its original comers, and others filled their places, silently, with airy graceful movements and happy faces, till the whole floor at length was covered with the soundless feet and whirling forms of those who had already left the world. And, as the artificial light faded away, there came in its place a soft white light that filled the room with beauty and made all the faces look radiant. And, once, as they skimmed past a mirror, he saw that the girl beside him was not there—that he seemed to be dancing alone, clasping no one; yet when he glanced down, there was her magical face at his shoulder and he felt her little form pressing up against him.

Such dancing, too, he had never even dreamed about, for it was like swinging with the treetops in the winds.

Then they danced farther out, ever swifter and swifter, past the shadows beneath the gallery, under the motionless hanging flags—and out into the night. The walls were behind them. They were off their feet and the wind was in their hair. They were rising, rising, rising towards the stars.

He felt the cool air of the open sky on his cheeks, and when he looked down, as they cleared the summit of the dark-lying hills, he saw that Issidy had melted away into himself and they had become one being. And he knew then that his heart would never pain him again on earth, or cause him to fear for any of his beloved dreams.

But the manager of the “hateful office” only knew two days later why Browne had not turned up to his desk, nor sent any word to explain his absence. He read it in the paper—how he had dropped down dead at a dance, suddenly stricken by heart disease. It happened just before two o’clock in the morning.

“Well,” thought the manager, “he’s no loss to us anyhow. He had

no real business instincts. Smith will do his work much better—and for less money too."

Kolofono



“*The Dance of Death*”

VERKO: ALGERNON BLACKWOOD (1907) CC-PD

SKRIBO: Blackwood Stories (2010) CC0

“La Mortodanco”

TRADUKO KAJ ELDONO: PAUL KING (2024) CC0

Kovrilo estas el *Dance of Death* de MICHAEL WOLGEMUT (1493) CC-PD

Uzante ilojn kaj formatojn de *Standard Ebooks*

Kopirajto

Senpaga kaj Libera

Free